

DIA REGNO

ISSN 0167-9554

DIA REGNO

◉ dumonata kristana revuo en esperanto ◉ n-ro 4 (847) 2004 ◉

LA ĈIJARA KONGRESEJO



BIBLIO

KOMENCO

TACITO

RAPORTO

KELI

Kristana Esperantista Ligo Internacia
fondita en 1911, neneŭtrala, kunlaboranta
kun UEA

Celo: Krei efikan kontakton inter kristanoj el diversaj landoj kaj per Esperanto diskonigi la Evangelion pri Jesuo Kristo.

Prezidanto: Jacques TUINDER

✉ Henegouwenlaan 35, NL 1966 RH Heemskeerck
☎ +31 251 231941;
✉ d.tuinder-dekker@wolmail.nl

Sekretario: Els VAN DIJK-KUPERUS

✉ Koningsmantel 4, NL 2403 HZ Alphen a/d Rijn,
Nederlando; ☎ +31 1724 20222;
✉ j.a.van.dijk@hetnet.nl

Kasisto: Siegfried KRÜGER

✉ Dinkelsbühler Str. 12, DE 74074
Heilbronn, Germanio; ☎ +49 7131 162688;
✉ SLKrueger@gmx.de

Kotizoj: Rekta membro kun gazeto, minimume
€ 20,- ☎ Membro-subtenanto € 30,- ☎ Nura
abono: pagante rekte al KELI € 16,- ☎ pagante al
Libroservo € 18,- Sendoj de okcidentaj monbiletoj
per registrita letero al la kasisto de KELI ☎ Se
estas en via lando UEA-poŝtĝironto (informiĝu
ĉe UEA) bonvolu preferi pagi al UEA por konto
kelk-p de KELI ☎ Nederlanda poŝtĝironto de
KELI: 5506132.

DIA REGNO

Oficiala organo de KELI, fondita en 1908
dumonata revuo — ISSN 0167-9554

Redaktoro: Philippe COUSSON

✉ 26 rue de Pré-Ventenet, FR 86340
Nouaillé-Maupertuis, Francio;
☎ +33 (0)5 49 46 80 21;
✉ diaregno@altern.com.

Abonprezo sen membreco en KELI: € 16,- aŭ
egalvaloro. Abonoj kaj anonckostoj pagotaj al la
kasisto de KELI (vidu supre).

*Pri la enhavo de la artikoloj respondecas nur la
aŭtoroj. Represo kaj traduko permesataj, kondiĉe,
ke oni citas la fonton. Specimenon kun represo aŭ
traduko oni sendu al la Redaktoro.*

**Enpaĝigo, grafika prilaboro, presado
kaj ekspedado:**

Eldonejo HEJME Kazimierz LEJA
✉ pf. 59, PL 41-250 Czeladź, Pollando
☎ +48 32 2650038; ✉ esperanto@hejme.e-tools.pl

ENHAVTABELO

- 75 Voĉleterujo
76 Kanti Dian kanton sur fremda tero
77 Kiu estas via „dio“?
78 Ĉielo kaj infero
78 La edziĝo en Kana
79 „En la komenco Dio kreis la ĉielon kaj la teron“
83 Ĉu vi scias, ke vi mem estas menciita en la Biblio?
83 Tacito — El la kvina libro, tradukita de Gerrit Berveling
91 81a Germana Esperanto-Kongreso
91 Tagordo de la Jarkunveno de KELI
93 Financaj raportoj de la Kasisto
96 LESSING-jubileo

Karaj gefratoj en Kristo,

nia kongreso havos diversajn trajtojn. Inter ili, ĝi estos la unua post Adolf. Li tiel markis niajn kongresojn, ke mi povas tre malfacile antaŭvidi kiel tio nun eblas, kvankam li jam ne ĉeestis kelkajn.

Krome, ni devas fronti diversajn mal-kreskajn problemojn. Fakte, ni devos pritrakti la estontecon de nia Ligo. Se vi ne ĉeestos, ni certe bezonos viajn preĝojn.

Ĉi tiu numero enhavas du pli longajn pecojn, kaj diversajn pecetojn. Mi esperas, ke vi prenos tempon por legi ilin, sendonte, se dezire, reagojn al la redakcio. Krome en ĝi troviĝas la financa raporto.

La temo de nia kongreso estos «La Graco». Ni vivu per ĝi.

Kore

Philippe COUSSON

VOĈLETERUJO

*Se mi vidus maljustaĵon en mia koro,
mia Sinjoro min ne aŭskultis.*
(Psalmo 66:18)

Vi petas kaj ne ricevis, tial, ke vi petas malprave, por ke vi elspezu por viaj voluptoj.
(Jakobo 4:3)

Amiko mia kaj mi iris al iu afercentro por telefoni. Dum mi telefonis, la telefonistino pardonpetis ĉar la telefonvoko jam eniris en la voĉleterujon. Li ne povis paroli kun sia edzino tiutage. Tiu reale dolorigis lin.

Kelkajn tagojn poste, ŝercdesegnisto revivigis la okazaĵon dum mi legis kiel li portretis imagitan malamikon dezirante lin jene: „Liaj preĝoj eniru voĉleterujon“. Tio estas, Dio ne respondu al liaj preĝoj. Mi ekpensis: kio enirigas preĝon en la „voĉleterujon“ de Dio?

Kvankam Dio respondas al niaj preĝoj per unu el la tri manieroj: per Jeso, per neo, aŭ per atendigo, tamen la Sankta Biblio mencias kelkajn kialojn de nerespondo al preĝoj.

La unua kialo estas peko (Psalmo 66:18; Sentencoj 1:28; 15:8,29; Jesaja 1:15; Miĥa 3:4). *Vidu, ne mallongiĝis la mano de la Eternulo, por ke ĝi ne povu helpi; kaj ne malakriĝis Lia orelo, por ke Li ne aŭdu. Nur viaj krimoj estis disigilo inter vi kaj via Dio, kaj viaj pekoj kovris antaŭ vi Lian vizaĝon, por ke Li ne aŭdu* (Jesaja 59:1–2). *Ni scias, ke Dio ne atentis pekulojn; sed iu estas adoranto de Dio kaj plenumas Lian Volon, tiun Li atentis* (Johano 9:31).

Alia kialo estas malbonkoreco de la pekulo. Sentencoj 21:13 deklaras: *Se iu ŝtopas sian orelon kontraŭ kreado de malriĉulo, li ankaŭ vokas kaj ne estos aŭskultata*. Vidu ankaŭ en Sentencoj 28:9.

Dubo ankaŭ povas enirigi niajn preĝojn en la „voĉleterujon“ de Dio. Jakob skribis: *Sed li petu en fido, neniel dubante; ĉar la dubanto similas ondon de la maro, ventopelatan kaj skuatan. Ĉar tiu homo ne pensu ke li ricevos ion de la Sinjoro — duoblanima homo, ŝanceliĝa en ĉiuj siaj vojoj* (Jakobo 1:6–8). Vidu ankaŭ en Mateo 21:22; Marko 11:22–24; Hebreoj 11:6.

Misdeziroj povas malhelpi niajn preĝojn. Ree, aŭskultu Jakobon: *Vi petas kaj ne ricevis, tial, ke vi petas malprave, por ke vi elspezu por viaj voluptoj* (Jakobo 4:3).

Apud ĉiaj misdeziroj staras nur sinama deziro. David preĝis kaj fastis fervore pro la vivo de la infano, kiun li naskis el adulto kun la edzino de Urija, sed liaj preĝoj eniris la voĉleterujon de Dio. La infano fakte mortis (2 Samu-el 12:15–18).

Same, Elija volis morti pro la timo de Izebel. Dio ne plenumis lian deziron (1 Reĝoj 19:1–5).

Kiu el ĉi tiuj kialoj igas viajn preĝojn „eniri la voĉleterujon“ de Dio?

La malveneno kontraŭ ĉiuj estas ĝusta starado antaŭ Dio kaj ĉioma fido al Li. Viaj preĝoj ne eniru la voĉpoŝton de Dio. Amen.

Je la servo de Dio,

pastoro Bayo AFOLARANMI

Biblia Rakonto Reverkita

La knabino silentis por subaŭskulti kion la du virinoj diskutis en la salono. Kion ili diskutis dum la mallongtempa vizito de la amikino de sia mastrino precipe temis pri la problemo de la mastro, la tre respektata militestro en la lando Siria. La knabino imagis kiom eĉ pli multe oni estimus lin, se li ne havus la problemon. Ŝi tre kompatis lin kaj foje preĝis al sia Dio, ke Li helpu lin.

La knabino jam servis en la familio ek de la tempo, kiam Sirio invadis sian landon kaj forkaptis multajn posedaĵojn kaj homojn, inter kiuj ŝi estis. Malgraŭ tio, ŝi ne senkuraĝiĝis. Kvankam ŝi foje membris siajn familianojn kaj amikojn, ke ŝi eble eterne perdis ilin, ŝi tamen kredis, ke ŝi ne forperdiĝis el la ĉeesto de la Dio de Izraelo.

Emociplene ekstaris la vizitinto kaj adiaŭis. La du ne sciis, ke la knabino tra la kuireja pordo, rigardis ilin kaj aŭdis ĉion, kion ili diskutis. La knabino ne plu povis elteni sian emociion, kiel ŝia mastrino laŭte singultis. Ŝi povis atendi nur ĝis eliro de la vizitinto antaŭ ol veni al la salono por alparoli sian mastrinon. Sed kiam ŝi alvenis, ŝi ne sciis kiel komenci. Ankaŭ ŝi ne povis tute kaŝi sian surprizan miron, ke la vizaĝesprimado de la virino povis tiom subite ŝanĝiĝi, kiam ŝi alvenis, kvazaŭ ĉio estas en ordo. Por perfekte kaŝi sian emociion la virino diris: „Ĉu vi jam rompintis teleron?”

„Ne”, respondis la knabino. „Vi do jam bruligis mian supon, ĉu ne?” „Ne, mastrino”, respondis la knabino. „Kial do skuiĝas vi kiel folieto, kiu falis sur malkvietigitan akvon?” Sen vorto la knabino surgenuas, klinas sian kapon kvazaŭ la virino estus ia

idolo, kaj diras: „Pardonu, ke mi trudiĝas al via familia afero, sed mi volas diri, ke mi havas sugeston rilate la problemon de la sinjora militestro, via edzo”.

La vizaĝo de la virino iomete lumiĝis per espero, sed la vizaĝo tuj senpaliĝis, eble kiam en sia koro ŝi rezonis, ke neniulo kiel izraela servistino, neniel povus helpi. Tamen ŝi diris ion, kio ne tute pravigis tion: „Ĉu ja eblas, ke seka ligno floru?”

Ankoraŭ restante sur siaj genuoj, kvankam ŝi ne komprenis la diron, la knabino respondis, nun pli kuraĝe: „Jes, eblas. Eĉ en la historio de mia lando, oni foje rakontis pri nia prapatro Aaron, kies seka bastono floris.”

„Tute vi ne komprenis min, ni nur miras, ĉu eblas, ke mia edzo resaniĝu. Ĉu oni povus tute forigi lian lepron?”

„Jes, sinjorino mastrino, se li akceptus viziti la profeton en mia lando, se li ne konsiderus tion tre hontinda afero, li resaniĝos. La Dio de mia lando kapablas fari ĉion.”

Per siaj du manoj kare levis la knabinon la sinjoro. La resto de la rakonto en 1 Reĝoj 5 montras, ke oni tuj informis la reĝon pri la afero. Tuj je ordono de la reĝo la knabino estis invitata por plurakonti pri sia Dio kaj ties profeto en sia lando. Ne multaj el la ĉeestintoj povis kredi ĉion, kion ŝi diris pri sia Dio kaj ties potenco. La sola maniero pruvi tion, estas sendi la militestron Naaman al Izraelo por resanigo. Li ja iris, kaj post simplaj sepfojaj naĝoj en Jordano li resaniĝis je la miro de ĉiuj.

Kiam revenis Naaman al sia lando resaniĝinte, la knabino ne povis kaŝi sian dankesprimon al sia Dio, ke Li ne desaponitis ŝin. Ŝi rakontis pri boneco kaj potenco

Kiam la popolo vidis, ke Moseo longe ne malsuprenvenas de la monto, la popolo kolektiĝis antaŭ Aaron, kaj diris al li: Leviĝu, faru al ni diojn, kiuj irus antaŭ ni; ĉar pri tiu Moseo, la viro, kiu elkondukis nin el la lando Egipta, ni ne scias, kio fariĝis kun li. (Eliro 32:1)

Sed kun ni estas la Eternulo, nia Dio; ni ne forlasis Lin? (2 Kroniko 13:10)

La popolo de Izrael, kiun Moseo elkondukis el la servuto en la lando Egipta, estis obstina. Ilia obstineco kontraŭ la plano de Dio evidentiĝis je la tago kiam Faraono plii-



de sia Dio en fremda lando, malpermesinte, ke doloro de kaptigo malhelpus tion. Tio ja estas kontraŭa al la opinio de la resto de la Izraelidoj, kiam iam, kiel ŝi ili estis forkaptitaj al Babelo, kaj oni petis ilin rakonti pri ilia Dio. Ili simple forjetis siajn muzikilojn kaj emociie respondis: *Kiel ni kantas sur fremda tero la kanton de Eternulo?* (Psalmo 137:4)

Nu, kiel kristanoj, ne gravas kiom ni suferas, necesas ĉiam esprimi la bonecon de Dio antaŭ nekredantoj. Kristanoj ne senkaŭze suferas kaj la kaŭzoj estas justaj: eble Dio volas tiel demonstri sian potencon aŭ bonecon. Do kiam ni troviĝas sur „fremda tero” de tento aŭ sufero, ni ne diru kiel erare faris niaj prapatroj „kiel ni kantas sur fremda tero la kanton de Eternulo?”

Olúwábùnmi Gabriel Ọ̀SHÓ–DAVIES

gis ilian ŝarĝon pro la peto: *Permesu, ke ni iru vojon de tri tagoj en la dezerton kaj alportu oferon al la Eternulo?*

Tamen, ilia diraĵo en Eliro 32:1 montras ke Moseo jam fariĝis ilia dio. Kiam Moseo restis kun la Eternulo pro ili, kaj ili ne vidis lin, ili bezonis alian „dion” kiu plukondukus ilin en ilia migrado.

Ĉu Moseo vere estis la persono, kiu elkondukis ilin el la lando Egipta aŭ li estis ĵus la ilo en la manoj de Dio, la reala Savinto? Ĉu la popolo de Izrael vere bezonis vidi Moseon antaŭ ol daŭrigi sian vojiradon al la Promesita Lando? Ĉu ili havis videblan „dion” kiu kondukus ilin al ilia ircelo?

Multfoje ankaŭ ni pensas kaj agas kiel la Izraelidoj. Ni adoras iun aŭ ion. Scie aŭ nescie, ni idoligas tiun personon aŭ aĵon. Perdinte lin aŭ ĝin, ni perdas ankaŭ la esperon kaj provas trovi anstataŭan ion aŭ iun.

Laŭ kelkaj homoj, pastoroj/pastroj kaj aliaj estroj estas „dioj”. Dum tiuj pastoroj/pastroj aŭ aliaj estroj surlokas, la homoj agemas en la kristanara kaj spirita vivo. Tuj post la foriro de la pastro/pastoro, la situacio ŝanĝiĝas al la mala.

Kiu aŭ kio estas via „dio”? En kiun aŭ kion estas via fido? La skribinto de la epistolo al la Hebreoj admonis: *...direktante la rigardon al la aŭtoro kaj perfektiganto de la fido, Jesuo? (12:2)*. Via rigardo direktita al io aŭ iu ajn alia agigus nin simile al la popolo Izraela. Lasu la Eternulon Dio esti via Dio. Nur Lin vi fidu. Li ne senesperigos vin.

Unuj fidas veturilojn, aliaj ĉevalojn; sed ni alvokas la nomon de la Eternulo, nia Dio. (Ps. 20:7)

Je la servo de Dio,

pastoro Bayo AFOLARANMI

ĈIELO KAJ INFERO

Rabeno petis iam Dion, havi permeson vidi la ĉielon kaj la inferon. Dio permesis tion al li kaj donis al li la profeton Elija kiel gvidanton. Elija gvidis la rabenon unue en grandan ejon, en kies mezo sur fajro staris poto kun delikata manĝaĵo. Ĉirkaŭe sidis homoj kun longaj kuleroj kaj ĉerpis ĉiuj el la poto. Sed la homoj aspektis palaj, magraj kaj mizeraj. Ĉar la teniloj de iliaj kuleroj estis tiel multe tro longaj, ke ili ne kapablis porti la bonegan manĝaĵon en la buŝon. Kiam la vizitantoj reestis ekstere, demandis la rabeno la profeton, kiu stranga loko tio estis. Ĝi estis la infero.

Sekve de tio Elija gvidis la rabenon en duan ejon, kiu tute same aspektis kiel la unua. En la mezo de la ejo brulis fajro, kaj tie oni kuiris delikatan manĝaĵon. Homoj sidis ĉirkaŭe kun longaj kuleroj enmane. Sed ĉiuj estis bone nutritaj, sanaj kaj feliĉaj. Ili ne provis mem manĝigi sin, sed uzis la longajn kulerojn por reciproke doni manĝaĵon. Ĉi tiu ejo estis la ĉielo!

1. Jen, kiel bone kaj ĉarme estas, se frattoj vivas kunel! 2. Kiel la bona oleo, kiu de la kapo defluas sur la barbon, la barbon de Aaron, kaj defluas sur la randon de lia vesto; 3. kiel la roso, kiu de Hermon malleviĝas sur la montojn de Cion; ĉar tie la Eternulo donas la benon.

Psalmo 133:1-3

LA EDZIĜO EN KANA

1 La trian tagon okazis edziĝo en Kana Galilea, kaj la patrino de Jesuo ĉeestis tie; 2 ankaŭ Jesuo kaj liaj disĉiploj estis invititaj al la edziĝo. 3 Kaj kiam mankis vino, la patrino de Jesuo diris al li: Ili ne havas vinon. 4 Kaj Jesuo diris al ŝi: Kio estas inter mi kaj vi, virino? mia horo ankoraŭ ne venis. 5 Lia patrino diris al la servantoj: Kion ajn li diros al vi, tion faru. 6 Kaj estis tie ses akvokuvoĵoj ŝtonaj, metitaj laŭ la purigo de la Judoj, enhavantaj po du ĝis tri metroj. 7 Jesuo diris al ili: Plenigu la akvokuvojn per akvo. Kaj oni plenigis ilin ĝis la rando. 8 Kaj li diris al ili: Ĉerpu nun, kaj alportu al la festenestro. Kaj oni alportis. 9 Kiam la festenestro gustumis la akvon, nun fariĝintan vino, kaj ne sciis, de kie ĝi estas (sciis tamen la servantoj, kiuj ĉerpis la akvon), la festenestro alvokis la fianĉon, 10 kaj diris al li: Ĉiu homo prezentas unue la bonan vinon, kaj kiam oni jam drinkis, tiam la malpli bonan; sed vi rezervis la bonan vinon ĝis nun. 11 Ĉi tiun komencan de signoj Jesuo faris en Kana Galilea, kaj elmontris sian gloron, kaj liaj disĉiploj kredis al li.

Ho Kristo, mia Reĝo, mi obeu Vin en ĉio, kion mi faras. Donu ke ĉiu penso estu laŭ Via volo. Mia animo servu Vin seninterrompe en profunda respekto, kaj servi Vin ja signifas servi miajn kunhomojn!

Jelly KOOPMANS-SCHOTANUS

„EN LA KOMENCO DIO KREIS LA ĈIELON KAJ LA TERON“ (GEN. 1:1)

aŭ pensoj pri la kredo kaj modernaj mondkonceptoj

1. Enkonduko

Por kompreni tekston helpas scii ion pri la tempo kaj la cirkonstancoj, dum kiu ĝi estis verkata. Ekzemple la poemon „Branĉo de l' migdala arb“ (Adoru 915) en la jaro 1942 verkis Schalom Ben-Chorin. En la sama jaro okazis en Berlino la Wannsee-konferenco, kiu preparolis la teknikajn detalojn de la amasmurdo kontraŭ ĉiuj eŭropaj judoj. Se mi ne sciis, en kiu kruela tempo la poemo estis verkita, kaj ke la germana juda aŭtoro (Lia naskiĝnomo estis Fritz Rosenthal) devis fuĝi en 1935 el sia hejmurbo Munkeno post arestoj kaj torturoj, mi apenaŭ opinius la esperon de la kanto pli ol pia, malserioza babilado. Dietrich Bonhoeffer verkis la kanton „Sub ŝirm' mirinda de potencoj“ (Adoru 490) en berlina malliberejo. Ĝi estis donaco al liaj gepatroj je kristnasko 1944. Kiom da semajnoj estis antaŭ lia ekzekuto?

2. Kiel kreis Dio la mondon?

Mi petas vin tralegi la unuajn du ĉapitrojn de la biblio antaŭ ol vi plulegos tiun ĉi artikolon.

Dum jarcentoj kristanoj „unuigis“ ambaŭ ĉapitrojn pri la kreado de la mondo: Genezo 1:1 ĝis 2, 4a (a signifas unuan parton de versiklo, b duan parton) estas superrigardo pri la kreado de la mondo dum 7 tagoj kaj Gen. 2:4b ĝis 25 donas pliajn detalojn la kreado de la unua homa paro. Same faris belegaj freskoj en malnovaj preĝejoj. Kial do teo-

logoj ekde almenaŭ tri jarcentoj asertas, ke estas du nekongruaj rakontoj? La reformaciaj eklezioj — kontraste al la tiama Rom-Katolika Eklezio — opiniis, ke nek la papo nek la sankta tradicio, sed nur la biblio estas bazo kaj kontrolilo por teologio kaj kredo: „sola scriptura“, nur la biblio. Tial oni tre intense studis la biblion por pli bona kompreno. Tiel oni rimarkis „malglataĵojn“ en la teksto, kiuj por antaŭaj generacioj ŝajnis malgravaj. Ekzemple kelkaj historioj ripetigis. Sed la detaloj de tiuj dublaĵoj kelkfoje estas tiel malkongruaj, ke oni i. a. konkludis, ke ne Moseo verkis „la kvin librojn de Moseo“. Tiuj estas kombinita el diverstempaj dokumentoj. (Cetere la biblio ne asertas, ke Moseo verkis tiujn librojn. La nomon ili ricevis, ĉar Moseo estas en ili la plej grava persono.) Mi ne prezentos al vi la aktualajn teoriojn, nur por interesatoj mi mencias, ke tradicie Gen. 1:1 ĝis 2:4a apartenu al la tielnomata „Verko de la Sacerdotoj“ (germane: „Priesterschrift“) kaj Gen. 2:4b ĝis 25 al la „Jahvistoj“ (germane: „Jahwist“).

Ĉu vere la du rakontoj estis iam memstaraj? Gen. 1:1 ĝis 2:4a rakontas, ke Dio kreis la mondon dum 7 tagoj. Sed poste ni legas en Gen. 2:5, ke en la mondo ankoraŭ ne estis arbustoj, arboj kaj homoj. Ĉu Dio ne kreis tiujn dum la 3a kaj 6a tago (Gen. 1:11... respektive 1:26...)? La dua rakonto uzas malabstraktajn vortojn por la kreado: Dio „modlis“ kiel potfaristo la homon

el terpeco kaj enblovis la spiron de la vivo. (La hebrean verbon „*jacar*” (esperante: „modli, formi”) Zamenhof libere tradukis per „krei.”) Legante ni konstatas, ke „la homo” en 2:7 efektive estis viro. Do oni ne povas argumenti, ke ĉapitro 1 parolis nur pri la kreado de la viro (komparu 1:27 „en formo de viro kaj virino Li kreis ilin”) kaj ke ĉapitro 2 kompletigas per la rakonto pri la kreado de la virino el unu vira ripo. Ni do povas konkludi: Estas du memstaraj rakontoj kun specifaj diferencoj.

Nun ni rigardos la duan rakonton en Gen. 2:4b–25: Post la modlado de la homo Dio plantas ĝardenon, enmetas la homon kaj kreskigas variajn arbojn. Sole mankas la bestoj, kiujn en Gen. 2:19 Dio modlas ankaŭ el tero kaj prezentas al la homo.

La kreo de la bestoj havas la sencon, doni al la homo helpanton (2:18), sed inter la bestoj ne troviĝas helpanto simila al li (2:20). Tial Dio faligis profundan dormon al la homo kaj konstruas el ripo de la viro taŭgan helpanton, la „vir-in-on”. Ni hodiaŭ ankoraŭ povas senti la jubilon de la viro pri „lia” virino (2:23): *Jen nun ŝi estas osto el miaj ostoj kaj karno el mia karno; ŝi estu nomata Virino, ĉar el Viro ŝi estas prenita.* La ĝojo, ke viro kaj virino apartenas unu al la alia, estas la bela kulmino de la dua rakonto.

Laŭ Gen. 2:5–6 la tero en la komenco estis seka, senviva dezerto, antaŭ ol nebulo malsekigas la landon. Verŝajne la rakontintoj mem spertis, ke akvo estas dia beno kaj akvomanko morto. Al mi tre plaĉas la maniero, kiel la dua rakonto prezentas Dion. Mi nun ne parolas pri tio, ke tiu uzas la dinomon „Jahve” (Zamenhof tradukis „Dio”, aliaj tradu-

koj skribas majuskle „la SINJORO”, por indiki, ke en la hebrea teksto troviĝas la dinomo „Jahve”), sed la unua rakonto nur la vorton „Dio”. Al mi plaĉas, ke ĝi parolas pri Dio kvazaŭ li estus homo: Dio prenas teron kaj modlas la homon, plantas ĝardenon, metas la homon en la ĝardenon, parolas kun li, operacias kaj en Gen. 3:8 vespere eĉ promenas en la freŝiga malvarmeto. Mi bone komprenas, kial artistoj ofte prezentis ĉi tiujn scenojn el la ĝardeno Eden. Certe tia prezento ankaŭ kaŭzas problemojn. Ekzemple multaj homoj erare supozas, ke Dio aspektas kiel majuna viro. Mi mem ne dubas, ke Dio ne estas viro, sed tiuj simpatiaj „bildoj” donas al mi deziron, konatiĝi ku „li”.

Nun ni rigardos la unuan rakonton en Gen. 1:1–2, 4a. Ĝi skizas el pli distanca, supra perspektivo. Dum sep tagoj en ekzakte priskribita sinsekvo estis kreata la mondo sole per la vorto de Dio: Dio parolis kaj fariĝis tiel. Konstrumaterialo ne necesis, metiistaj vortoj ne aperas. Tralegante ni tuj rimarkas la septagan strukturon: En la unua tago Dio kreas la lumon, en la dua la „firmaĵon” aŭ firmamenton kaj per ĝi dividas la akvon sub la firmaĵo de la akvo super la firmaĵo (1:7). Kion signifas tio? Mi aldonis bildeton, sur kiu videblas la mondkoncepto de la Babilonanoj: Estas du oceanoj, unu sub la firmamento, do la normalaj maroj, kaj unu super la travidebla firmamento. Por ni la ideo, ke super ni estas oceano, en la unua momento ŝajnas absurda. Sed ni ne forgesu, ke tiam la plej bonaj astronomoj vivis en Babilono kaj ke eroj de la babilona mondkoncepto — kiel ekzemple la diskoformo de la tero — dum jar-miloj estis popularaj. Krome ilia mondkoncepto povis deklari multajn astrono-

miajn kaj atmosferajn fenomenojn: Kial pluvas? Ĉar en la ĉielo estas fenestroj, kiuj malfermiĝas kaj tial fluas akvo el la ĉiela oceano suben. Kial la ĉielo estas blua? Ĉar super ni estas akvo... Cetero en Gen. 7:11 vi povas legi rilate al la komenco de la diluvo: *En la sescenta jaro de la vivo de Noa, en la dua monato, en la dek-sepa tago de la monato, en tiu tago disfendiĝis ĉiuj fontoj de la granda abismo kaj la aperturoj („fenestroj”) de la ĉielo malfermiĝis.* Oni povus diri, ke la mondo per la diluvo estis reĵetata antaŭ la trian tagon de la kreado, dum kiu Dio kolektis la akvon sub la firmamento en marojn kaj kreis la plantojn.

En la kvara tago de la kreado sekvis suno, luno kaj la steloj. Estas interesa, ke la rakonto nur parolas pri *lumajoj* kaj tute ne mencias la nomojn „suno” aŭ „luno”. Tiel ĝi atakas la babilonan adoradon de la astronomiaj objektoj. La Babilonanoj kredis, ke la suno, la luno kaj ĉiuj steloj estas potencaj Dioj. Por babilonaj aŭskultantoj tiu rakonto estus blasfemia, ĉar ĝi parolas nur pri lumajoj, do mortaj lampoj. Sekvas en la kvina tago la akvobestoj kaj la birdoj, kiuj cetero laŭ la evolucia teorio estas parencaj, en la sesa tago la landbestoj kaj la homo *en formo de viro kaj virino*. Kaj en la sepa tago sekvas la sekreta kulmino de la kreado, kiun Dio nur post longa tempo malkaŝos al Moseo kaj al sia popolo (legu foje en Eliro ekde ĉapitro 16): la sabato. Kvankam jam ekde la kreado ekzistis la sabato, nur Israelo, la popolo de Dio, sed ne ni, la „paganaj” popoloj, konas ĝin.

Ĉiam denove estas provoj harmoniigi la unuan rakonton kun la moderna mondkoncepto. Ekzemple la germana fizikisto Werner GITT argumentas, ke

Gen. 1:1 ĝis 2:4a kongruas kun la moderna teorio pri la evoluo de la tero kaj la vivo. Li opinias, ke observanto, kiu dum la kreado staras sur la surfaco de la tero, observus ekzakte la sinsekvon de la biblia rakonto: La steloj (4a tago) ja videblis nur post la klariĝo de la praatmosfero, do nur post la kolektiĝo de la akvo en la praocanon (2a tago) kaj la komenco de la fotosintezo de la plantoj (3a tago). La suno jam dum la unua tago donis la lumon, sed tra la dikaj nuboj de la praatmosfero ĝi ankoraŭ ne videblis sur la tersurfaco.

Sed mi dubas, ĉu la teksto volas rakonti *tion ĉi*. La teksto ja parolas pri *sep tagoj*, ĉiuj kun propraj vesperoj kaj matenoj, kaj Dio mem respektas en la sepa tago la sabaton: *kaj Li ripozis en la sepa tago de la tuta laboro, kiun Li faris* (Gen. 2:2). Tial „tago” ne povas signifi „longa epoko”. Krome la frazoj, kiuj parolas pri la „firmaĵo” nur kompreneblas, se la aŭtoroj pensis, ke la firmamento estas travidebla, vitra volbajo aŭ duonglobo, super kiu estas akvo (Gen. 1:7).

Multajn detalojn ni povas kompreni, se ni vidas en ili reagon al la endubigo de la juda religio per la babilona religio: La sabato en la babilona ekzilo iĝis grava signo de la juda identeco. Antaŭe en la eksa hejmlando Judeo ĝi estis normala por ĉiuj, kiel por ni (ankoraŭ) estas la dimanĉo, sed male en la pagana Babilono. Se en Gen. 2:1 ĝis 3 la sabato estas la (sekreta) kulmino de la kreado, tiu substrekas la gravecon de tiu festotago por la juda malplimulto meze en la alireligia, senscia plimulto.

La Babilonanoj kredis, ke la tero, la homoj ktp. estis kreataj, el la korpoj de la mortigita diparo „Apsu” („Praocano”) kaj „Tiamat” („Naskulino”). Iliaj

infanoj volis regi kaj tial murdis la gepatrojn. La gvidanto de la ribelo kaj ĉefdio de la babilona imperio Marduk, disfendis la mortan korpon de sia patrio Tiamat kaj el ĝi konstruis la teron kaj la ĉielon. Por tiel diri la tero estis por la Babilonanoj dia, ne nur materia. Sed nia rakonto kontraŭas: Ĉio estis kreata sole per la vorto de Dio, nek pluraj Dioj kunlaboris, nek korpo de Dio estis disfendita. Post jarcentoj oni parolis pri „*creatio ex nihilo*”, kreado el la nenio. Oni ankaŭ povus nomi ĝin senmitologiigo (germane: „*Entmythologisierung*”) de la kreaĵo, ĉar ĉia dieco de la mondo, steloj ktp. estas neata. Cetere la hebrea verbo „*bara*” („*krei*”) signifas senanalogian kreadon, kiu ne estas komparebla kun ia homa metio (male al hebrea „*jacar*” en la dua rakonto). Kompreneble en la biblio nur Dio povas esti la subjekto de la vorto „*bara*”.

Kie kaj kiam verŝajne estis verkata la unua rakonto (Gen. 1:1 ĝis 2:4a)? En Babilono dum la ekzilo de la juda popolo, do post 587 antaŭ Kristo. La dua rakonto (Gen. 2:4b ĝis 2:25) supozeble estas pli malnova, ĉar ĝiaj versoj konas la timon de la kanaana kamparano pro la vivendanĝeriga sekeco. Tial probable oni rakontis ĝin jam antaŭ la ekzilo en Israelo. Ankaŭ ĝia pli viva, ne abstrakta parolo pri Dio indikas al pli granda aĝo.

Ĉu mi do devas decidi, kiu de la du rakontoj estas „ĝusta”? Eble do la septaga rakonto laŭ la interpreto de profesoro GITT? Ne. Ambaŭ estas veraj, ambaŭ estas „vorto de Dio”. Kvankam diversaj personoj en diversaj tempoj kaj lokoj rakontis aŭ verkis ilin, ambaŭ gloras la bonan kreaĵon de Dio. Kiam oni komponis la biblion, oni senprobleme

povintus elekti unun el la du rakontoj pri la kreado, aŭ oni povintus adapti la du rakontojn tiel, ke ne plu aperus la kontraŭdiroj inter la du. Ekzemple oni povus forstrecki el la dua ĉapitro la versojn 5 kaj 6 kaj la komencon de verso 19 (kreado de la bestoj el tero), por ke la dua, pli malnova rakonto pli malpli glate daŭrigas la unuan. Sed neniu faris tion! Kial? Ne ĉar oni forgesis ĝin, sed oni intence metis la du rakontojn unun post la alian sen cenzuro, ĉar oni fidis, ke ne gravas, kiel Dio kreis la mondon, sed ke li kreis kaj protektas ĝin. Niaj homaj mondkonceptoj venas kaj foriras, nia kreanto restas eterna!

Estas interesa fenomeno, ke ambaŭ tekstoj unuflanke akceptas la tiaman mondkoncepton, aliflanke ĝin kritikis. Ilia intenco ne estas doni „la” ĝustan bildon de la mondo, sed — per la uzo de la tiutempe aktuala mondkoncepto — montri al pli gravaj temoj. La dua, pli malnova rakonto emfazas, ke amo kaj amoro estas bonaj donacoj de la kreado, la dua, pli nova atakas la fremdajn, Babilonajn diojn, kaj certigas nin, ke ni povas fidi al Dio, eĉ se aliaj „dioj” aŭ ideologioj ŝajnas pli fidindaj ol la Dio de Israelo. Hodiaŭ ni ja scias, kiom grandaj estis la potenca Marduk kaj liaj kunuloj...

3. Konkludo

Moderna naturscienco kun ĝiaj teorioj (la praeksplozo, la teorio pri la evolucio, ...) ne devas esti problemo por la kredo. Sed ni — kiel la homoj, kiuj rakontis tiujn du historiojn — ne senkritike akceptu ĉian modan ideologion, sed kiel skribis Paŭlo: *Elprovu ĉion; tenu firme tion, kio estas bona.* (1. Tes. 5:21)

Wolfram ROHLOFF

Ĉu vi scias, ke vi mem estas menciita en la Biblio? Jes vere!

MI ESTAS:

- * Filo de Dio (Rom 8:16; Joh 1:12)
- * Liberigito el la mano de malamiko (Ps. 107:2)
- * Pardonita el miaj pekoj (Kol 1:13-14)
- * Savita per graco, per fido (Efez 2:8)
- * Pravigita (Rom 5:1)
- * Nova kreaĵo (2 Kor 5:17)
- * Sanktigita (1 Kor 1:30)
- * Partoprenanto en Dia naturo (2 Pet 1:4)
- * Liberigita el la potenco de mallumo (Kol 1:13)
- * Elaĉetita el la malbeno de la leĝo (Gal 3:13)
- * Gardita sur ĉiuj miaj vojoj (Ps 91:11)
- * Kondukita de la Spirito de Dio (Rom 8:14)
- * Satigata en ĉiuj miaj bezonoj (Fil 4:19)
- * Fortigita en La Sinjoro kaj en la fortoco de Lia potenco (Efe 6:10)
- * Surĵetanta sur Lin ĉian mian zorgon (1 Pet 5:7)
- * Heredanto de Dio, kunheredanto kun Kristo (Rom 8:17)
- * Penanta plenumi ĉiujn Liajn ordonojn (Rea 28:1-2)
- * Benata ĉe mia venado kaj mia elirado (Rea 28:6)

Elmer ESCOTO
San Pedro Sula, Honduro

Tacito, fama historiografiisto Latina, verkis i.a. amplekse sub la titolo Historioj; tio traktas la periodon de imperiestro Galbo ĝis la morto de Domiciano. Postrestas al ni nur la unuaj kvar libroj kaj komenco de la kvina (pri la jaroj 69 kaj 70; la jaro tri-imperiestra, la insurekcio de la Batavoj kaj la venko super Jerusalemo). La cetero de tiu ĉi tre detala historio bedaŭrinde perdiĝis. El la korespondado de Plinio ni scias, ke Tacito estis okupita pri tiu ĉi verko i.a. inter la jaroj 104-109.

Kelkaj eroj eble por nia publiko estas speciale interesaj:

El la Latina tradukis Gerrit Berveling

EL LA KVINA LIBRO:

70 p. Kr.: konkero de Jerusalemo

1 En la komenco de la sama jaro Cezaro Tito, elektita de sia patro elfini la submetadon de Judajo, kaj jam fama kiel generalo kiam li kaj la patro estis ankoraŭ civitanoj, tiutempe agadis per des pli da forto kaj kun des pli da rekono, ĉar provincoj kaj armeoj vete montradis sian entuziasmon. Kaj, por ke oni kreu lin supera je hazardaĵoj, li sin montradis brila kaj entreprenema armile, allogante aliajn al sindediĉo per afableco kaj interparoloj; ofte dum militistaj laboroj aŭ dum marŝado li sin miksis inter simplajn soldatojn, tamen sen noci la honoron de generalo.

Atendis lin en Judajo tri legioj, la Kvina, la Dekaj kaj la Dekkvina, veteranoj de Vespaziano. Aldonis li el Sirio la Dekduan kaj el Aleksandrio trupojn el la Dudekdua kaj la Tria. Akompanis

dudek kohortoj da asocioj, ok trupoj da kavalerio, krome ankaŭ la reĝoj Agripo kaj Sohajmo kaj la helptrupoj de reĝo Antioĝo kaj amaso da Araboj, fortaj kaj per sia kutima malamo tre minacaj kontraŭ la Judajaj, kaj multaj individuoj, el la Urbo kaj el Italio, kiujn alkondukis la espero konkeri la orelojn de princo, ankoraŭ ne okupitajn. Kun tiuj ĉi trupoj enirinte la teritorion de l' malamikoj, en vico laŭorda, ĉion esplorante kaj preta por tuja reago, ne diste de Jerusalemon li starigas la kampadejon.

2 Sed ĉar de fama urbo ni estas raportontaj la lastan tagon, ŝajnas konvene malkaŝi ĝiajn komencojn.

Laŭdire la Judajaj kiel rifuĝintoj el Kreto setlis sur la ekstremaĵon de Libio epoke, kiam Saturno perforte je Jovo cedis sian regadon. Argumenton oni serĉas ĉe l' nomo: famas sur Kreto monto Ida; la apude loĝantaj Idajaj barbare kromnomiĝis Judajaj. Kelkaj raportas, ke dum regado de Izisa la superflua en Egiptio loĝantaro, gvidate de Jerusalemo kaj Juda, evakuiĝis en proksimajn landojn; pluraj, ke estas idaro de Etiopoj, kiujn dum reĝo Kefeo timo kaj malamo pelis ŝanĝi loĝejon. Estas homoj, kiuj transdonas, ke Asiriaj fremduloj, popolaĵo manka je agroj, okupis parton de Egiptio, baldaŭ fondis proprajn urbojn sur Hebrea grundo kaj en la pli proksima Sirio. Ree aliaj scias faman originon de l' Judajaj: la Solimoj, gento celebrata en la kantoj de Homero, fondis urbon kaj faris el la sia ĝian nomon Jerusalemon.

3 La plimultaj aŭtoroj konfirmas ke, kiam estiĝis plago en Egiptio, kiu misfaris la korpojn, ke tiam reĝo Bokĥoro alirinte la orakolon de Hamono, petante rimedon, deziris purigi sian regnon

kaj ordonis al tiu homspeco — ĉar ja malamata de l' Dioj — formalaperi en aliajn landojn. La tiel kunigitan, arigitan plebaĉon, post kiam en dezertaj regionoj ĝi estis postlasita, Moseo kiel unusola el la ekzilitoj admonis, ke ili ne atendu iun helpon de Dioj aŭ homoj (ĉar ja de ambaŭ forlasitaj), sed ke ili fidu sin mem, sub gvido ĉiela [...] la tiamajn mizerojn ili forpuŝis. Ili konsentis kaj sensciaj pri ĉio komencis hazardan vojaĝon. Sed nenio turmentis same kiel la manko je akvo, kaj jam proksime al totala pereco tra la kampo ili ĉie eksvenis, kiam grego da azenoj sovaĝaj postpaŝte paŝis al deklivo boske ombrita. Moseo, sekvante, supozante tion pro la herbokovrateco de tiu loko, sukcesis malkovri larĝajn vejnojn da freŝa akvo. Tio estis refreŝigo, kaj senpaŭze ili vojaĝis ses tagojn, kaj je la sepa forpelinte la loĝintojn ili akiris la landon, en kiu ili fondis urbon kaj templon.

4 Moseo, por ligi al si la genton ankaŭ estonte, preskribis novan religion kontraŭan je tiu de l' ceteraj mortidevuloj. Profana estas tie ĉio, kio estas sankta ĉe ni, male permesata ĉe ili, kio por ni estas malmorala.

Bildon de la besto, laŭ kies montraĵo ili venkis vagadon kaj soifon, ili konsekris en la templinterne, buĉante virŝafon, verŝajne por montri malŝaton al Hamono. Ankaŭ virbovo estas oferata, ĉar la Egiptoj adoras Apison. De porko ili detenas sin, pro memoro je la plago, ĉar iam infektis ilin skabio, al kiu submetiĝas ĉe besto. Sian longan iaman malsaton ili ankoraŭ konfesas per oftaj fastoj, kaj por simboli la hastan manĝon, la Judaja pano estas senfermenta. La sepan tagon plaĉas nenifarado, laŭdire ĉar tiu tago alportis la fi-

non de iliaj suferoj; pli poste, pro la logado de nenifarado, ankaŭ la sepan jaron ili konsekris al mallaboremo. Aliaj diras, ke tio ĉi estas honoro por Saturno, ĉu ĉar la komencon de ilia religio liveris la Idajaj, kiuj laŭ niaj informoj estis forpelitaj kune kun Saturno kaj fondis ĉi genton, ĉu ĉar, inter la sep steloj kiuj regas la mortidevulojn, la stelo de Saturno iras la plej altan orbiton kaj estas la plej influa. Krome la plimultaj ĉielkorpoj kompletigas siajn vojojn kaj turniĝojn en sepobloj.

5 Tiujn ĉi ritojn, kiel ajn estiĝintajn, defendas ilia antikveco: la ceteraj institucioj — sinistraj kaj fiaj — ekvalidis pro aĉeco. La plej malbonaj homoj, malŝatante la prapatrajn religiojn, kontribuis tributojn kaj kotizojn, — tial kreskis la riĉo de l' Judajaj. Inter ili mem regas obstina lojalo, kaj pardone mo tuĵ pretas — sed al ĉiuj ceteraj nur malamika hato.

Apartigitate laŭmanĝe, disigitate laŭnupte, kvankam plej ama al libido, ĉi gento tamen sindetenas de sekskuniĝo kun fremdaj virinoj; sed inter si, nenio estas malpermesita. Cirkumcidi la generilojn ili ekkutimis, por distingiĝi per malsameco. Kaj kiuj transiras al ilia moraro, tiuj praktikas la samon, sed la unua afero, kiun ili lernas, estas malŝati la Diojn, seniĝi je sia patrio, konsideri senvaloraj siajn gepatrojn, infanojn, fratojn. Tamen ili zorgas pri kreskigo de sia nombro: estas granda mavo mortigi iun nedeziratan idon, kaj la animojn de bataleje aŭ mortpune pereintoj ili kredas senmortaj: de tio do ilia emo naskadi kaj ilia malŝato pri la morto. Kadavrojn ili preferas enterigi ol kremaci, laŭ moro Egipta, kaj iliaj okupiĝo kaj kredo pri la Subterejo estas simila;

sed rilate la ĉielajn aferojn ili konceptas tute male.

La Egiptoj adoras la plimulton de la bestoj kaj statuojn duonbestajn, sed la Judajaj nur mense perceptas unu solan Dion: profanaj estas, kiuj prezentas bildojn de Dioj pere de mortema materio laŭ homa aspekto; la Plej Alta kaj Eterna ne estas portretebla nek pereema. Tial en siaj urboj ili starigas neniujn statuojn, eĉ ne en la temploj. Siajn reĝojn ili ne tiom flatas, nek honoras la Cezarojn. Sed ĉar iliaj pastroj muzikas per flutoj kaj tamburoj kaj sin kronas per hedero, kaj ĉar en la templo oni malkovris oran vitbranĉon, tial kelkaj kredis, ke ili adoras Patron Libero, la Venkanton de Oriento, kvankam iliaj kutimoj neniel kongruas kun tio: Libero ja estigas gajajn kaj ĝojplenajn ritojn, dum la moroj de l' Judajaj estas sensencaj kaj senbrilaj.

6 Lando kaj limoj, almenaŭ orientdirekte, borderiĝas je Arabio; sude kuŝas Egiptio, okcidente la Fenicoj kaj la maro; la nordon el la flanko de Sirio ili dediste rigardas. Korpe la homoj estas sanaj kaj eltenas penadojn. Maloftas pluvo, grundo fekundas, agrikulturaj produktoj estas laŭ niaj kutimoj, krom tio ankaŭ balsamo kaj palmoj. La palmoj estas altaj kaj elegantaj, la balsamarbo estas modesta: laŭ tio ĉu ŝveliĝas ĝiaj branĉoj, se oni uzas feran tranĉilon, ĝiaj vejnoj ŝokiĝas; tial oni malfermas ilin pere de ŝtonpecetoj aŭ eroj de argilaĵo. La suko estas uzata por medicinaj celoj. La plej alta monto kiu tie leviĝas, estas Lebanono; mire por diri inter duontropika klimato, dense arbokovrita kaj daŭre neĝkovrita. Ĉe ankaŭ nutras kaj plenverŝas la riveron Jordan. Ne la maro akceptas Jor-

danon, sed ĝi fluas sendamaĝe tra du lagojn, fine absorbiĝas en trian lagon. Tio estas lago de ega amplekso, maro laŭaspekte, malpli bongusta ol ĝi, kaj pro la pezaj haladzoj malsaniga por la ĉirkaŭe loĝantoj. Neniu vento ĝin kirlas; ĝi ne toleras fiŝojn nek akvobirdojn. La senmova akvo portas la enĵetitajn objektojn, kvazaŭ ĝi estus firma grundo. Malsinkas en ĝi naĝantoj kaj eĉ homoj kiuj ne kapablas naĝi. Certasezone la lago sekrecias bitumon; la sperto, kiu instruas ĉiujn lertaĵojn, montris la manieron kolekti ĝin.

Sianature nigra fluidaĵo, ĝi solidiĝas se priverŝate per vinagro, kaj naĝas surakve. Permane ĝin kaptas tiuj, kies estas ĉi tasko, kaj ĝin tiras sur la ferdekon de l' ŝipo. Tiam sen ies helpo ĝi mem enfluas kaj ŝarĝas la boaton, ĝis oni ĝin detranĉas. Sed neblas tranĉi per bronzo aŭ fero: ĝi timas sangon aŭ vestaĵojn makulitajn per sango, kiun vironoj fluigas menstruante.

Tiel diras la malnovaj aŭtoroj, — sed kiuj konas tiun regionon, tiuj diras ke la flosanta amaso da bitumo permane estas pelata al la bordo, poste, kiam ĝi elsekiĝis sur la varma tero en la brula suno, oni povas dispecigi ĝin per hakiĵoj kaj kojnoj, kvazaŭ temus pri ŝtupoj aŭ ŝtonoj.

7 Ne malproksime de tie estas kampoj, kiuj laŭdire (iam fekundaj kaj loĝataj de grandaj urboj) forbrulis pro fulmotrafo; postrestas spuroj kaj la grundo mem aspektas brule kaj perdis sian fruktivan povon. Ĝar ĉiu natura kreskaĵo, ĉio home semita, ĉu nur ĝisfolie, ĉu ĝisflore aŭ komplete ĝi diskreskis, estas nigra kaj vana, kvazaŭ disfalas en cindron. Kvankam mi koncedas, ke iam famaj urboj povas esti forbrulintaj pro ĉiela

fajro, tamen mi kredas, ke haladzo el la lago infektas la grundon, venenas la aeron super ĝi, kaj ke tial la juna greno kaj la aŭtuna rikolto forputras: grundo kaj aero ambaŭ estas malfavoraj. Ankaŭ la rivero Belio enfluas en la Judajan maron; ĉirkaŭ ĝia buŝo estas sablo, kiun oni kolektas kaj miksas je natro por produkti vitron. Modesta estas la tiea strando kaj tamen neelĉerpebla, [senkonsidere] kiom oni de tie forportas.

8 Granda parto de Judajo estas priverŝita de vilaĝoj; ili havas ankaŭ urbojn. Jerusalem estas la ĉefurbo de la gento. Tie [estis] templo de senlima riĉo, — post la eksteraj fortikaĵoj la urbo, poste la reĝa palaco, la templo mem enfermita de interna fortikaĵo. Nur la Judajaj havis aliron al la pordego de la templo, kaj trans ĝian sojlon nur la pastroj.

Dum Asirianoj, Medoj kaj Persoj regis Orienton, ili estis la plej malŝatata speco inter la sklavoj: post kiam ekpovencis la Macedonoj, reĝo Antioĥo provis forigi ilian superstiĉon kaj provizi ilin per Helenismaj moroj, sed milito kontraŭ la Partoj malebligis lin plivilizi ĉi fian genton. Tio ĉi ja estis la momento de la insurekcio de Arsaĥo. Tiutempe, ĉar la Macedonoj estis senfortaj, la Partoj ankoraŭ ne fortiĝis (kaj la Romanoj estis malproksime), ili elektis al si proprajn reĝojn; la nestabila popolaĉo forpelis ilin, sed perarmile reestabliĝis la potenco. Sekvis ekzilo de civitanoj, neniigo de urboj, mortigo de fratoj, edzinoj kaj parencoj kaj ĉio alia, kio karakterizas despotismon. La superstiĉon ili favoris, ĉar ili akceptis la oficon de ĉefpastro kiel bazon de sia potenco.

9 El la Romanoj kiel unua Kajo Pom-

pejo submetis la Judajajn, kaj — rajtigite de sia venko — ilian templon li eniris: tiam diskoniĝis, ke en ĝi estas neĉiu bildo de Dio, ke malplenas la kul-tejo kaj neloĝatas la Plej Sankta Loko! La remparoj de Jerusalem estis neniigitaj, la sanktejo restis.

Baldaŭ, dum nia Civitana Milito, kiam tiuj provincoj transiris en la potencon de Marko Antonio, Pakoro, reĝo de l' Partoj, konkeris Judajon.

Mortigis lin Publio Ventidio. La Partoj estis repelitaj trans Eŭfraton, la Judajajn submetis Kajo Sosio. Antonio donis la reĝecon al Herodo. Post sia venko Aŭgusto ĝin faris pli glora. Post la morto de Herodo, sen atendi la decidon de l' Cezaro, certa Simo uzurpis la reĝan titolon. Kvintilio Varo, provincestro de Sirio, punis lin. La genton oni submetis kaj la filoj de Herodo fariĝis reĝoj en la trionigita lando. Dum Tiberio estis kviete.

Poste, ordonite de Kajo Cezaro, starigi lian statuon en la templo, ili preferis ekkaptis la armilojn: tiun insurekcion disigis la morto de l' Cezaro. Klaŭdio, kiam ĉu mortis ĉu malplifortiĝis la reĝoj, konfidis la provincon Judajo al Romaj kavaliroj aŭ al liberigitaj: unu el ili, Antonio Felikso, rolis tiranon kun sklava spirito, en ĉiuspecaj kruele kaj lascivo, kaj akceptis en geedzeco Drusilan, la nepinon de Kleopatra kaj Antonio, tiel ke Felikso iĝis la bonepo de la sama Antonio, kies nepo estis Klaŭdio mem.

10 Daŭris la pacienco de la Judajaj ĝis la prokuratoreco de Gesio Floro: dum lia ofidado estiĝis milito. Kiam Cestio Gallo, la legato de Sirio, provis sufoki ĝin, rezultis sendecidaj bataloj kaj sufiĉe ofte eĉ malvenkoj. Kiam tiu

morto pro sia fato aŭ sinmortigis pro naŭziĝo, Nerono sendis Vespazianon. Pro bonŝanco, famo kaj bonegaj subuloj, tiu en malpli ol du somerkampanjoj per sia venka armeo povis ekteni la tutan kampanon kaj ĉiujn urbojn krom Jerusalem. La sekva jaro estis koncentrita je la Civitana Milito kaj, kiom koncernas la Judajajn, pasis senfare. Sed kiam en Italio fariĝis paco, returniĝis la eksteraj zorgoj: al kolerego kontribuis, ke sole nur la Judajaj ne submetiĝis. Ŝajnis utile, ke Tito restu ĉe la armeoj por ĉiuj eventualoj aŭ missortoj de l' nova dinastio.

11 Stariginte do, kiel ni diris, kampandejojn antaŭ la muregoj de Jerusalem, li paradis siajn trupojn: la Judajaj ordigis batalvicojn tuj sub la remparoj, por riski sin pli foren ĉe prospero kaj, se ili repeliĝos, rifuĝejo estis preta. Estis sendita kontraŭ ili kavalerio kun malpezaj kohortoj, sendecide estis batalite. Baldaŭ ekcedis la malamikoj kaj en la sekvaj tagoj ili oftege batalis antaŭ la pordegoj; fine daŭraj perdoj pelis ilin malantaŭ la murojn. La Romanoj koncentriĝis al atako. Ja ne ŝajnis inde atendi, ke malsatos la malamikoj. Kaj ili petegis pri riskoj, parte pro kuraĝo, sed multaj pro feroco aŭ espero je premioj. Tito mem havis nur atenton pri Romo, riĉo aŭ seksaj plezuroj: kaj se Jerusalem ne falos tre baldaŭ, ties realiĝo ŝajne devos longe atendi.

Sed la urbon, situantan je altaĵo, fortikigis tiel gigantaj ŝirmaĵoj, ke eĉ en ebenaĵo ili sufiĉe povus defendi ĝin. Du montetojn gigante altajn ĉirkaŭis muroj ruze oblikvaj aŭ retrokurbiĝintaj, tiel ke la flankoj de atakantoj estu senŝirmaj kontraŭ sagoj. Je l' rando de la roko estis abismo kaj, kie subtenis la monto, ses-

dek futojn leviĝis la turoj, kaj ĉe l' interraj kavaĵoj eĉ ĝis cent dudek futojn, mirinda spektaklo tute ebena por kiuj dediste ĝin rigardis. Estis pliaj muroj interne ĉirkaŭ la palaco, kaj impona estis la fortikaĵo Antonia, kiun Herodo tiel nomis honore al Marko Antonio.

12 La templo [estis konstruita] kvazaŭ citadelo kun propraj muroj, kiuj superis la reston teknike. La portikoj mem, kiuj ĉirkaŭis la templon, estis eminenta defendejo. Estis fonto kun senhalta akvo, ĉambroj elhakitaj el la roko, akvujoj kaj cisterno por konservi pluvakvon. La konstruintoj antaŭvidis, pro iliaj strangaj moroj, oftajn militojn: tial ĉio estis preparita por sieĝo, kiom ajn longdaŭra. Post la konkero fare de Pompejo, timo kaj sperto instruis multon. Dank' al la avareco de l' epoko de Klaŭdio, ili aĉetis la rajton konstrui murojn, kaj tion ili faris pactempe kvazaŭ por milito. Jam granda kunfluejo, ĝi ege kreskis pro la pereco de l' ceteraj urboj. La plej konvinkitaj partizanoj tien kunfuĝis, kaj ili agitis des pli intense. Estis tri gvidantoj, same multaj armeoj: la eksterajn, plej ampleksajn murojn tenis Simo; la mezurbon Johano; la templon Eleazar. Johano kaj Simo disponis pri amaso kaj armiloj; Eleazar pri strategia loko. Sed [estiĝis] bataloj, embuskoj kaj incendioj inter ili; kaj granda kvanto da greno forbrulis. Johano sendis, laŭŝajne por oferadi, homojn kiuj buĉu Eleazaron kaj ties aron, kaj okupis la templon. Tiel la civito disfalis en du partiojn, ĝis pro alproksimiĝo de la Romanoj la milito kontraŭ eksteruloj reestablis la konkordon.

13 Okazis misaŭguroj, sed repacigi tiujn per oferoj aŭ votoj tiu superstiĉa gento opinias nepermesita, en sia ma-

lakcepto de vera religio. Enaere oni vidis interbatiĝi armeojn kaj lumbrilajn armaĵojn S kaj per subita fajro el nuboj eklumis en la templo. Apartiĝis subite la pordoj de l' sanktejo, kaj aŭdeblis voĉo superhoma, ke foriras la Dioj; ankaŭ estis ega bruoj de forirantoj. Malmultaj prenis tion por timiga: la plimulto havis la konvinkon, ke estas skribite en la praaĵ libroj de la pastroj, ke estas tio la momento, kiam triumfos Oriento kaj ke eliros el Judajo, kiuj ekregos ĉion. Tiu mistera profetaĵo fakte antaŭdiris Vespazianon kaj Titon, sed la popolaĉo, kiu laŭ homa kutimo interpretis nur al propra avantaĝo tiujn grandajn faktojn, eĉ meze de mizero ne konvertiĝis al la vero.

Ni informiĝis, ke la nombro de l' sieĝatoj, oldaj kaj junaj, viroj kaj virinoj, kune estis sescent mil: armilojn portis ĉiuj, kiuj tion kapablis, kaj ili estis pli kuraĝaj ol konformis al ilia nombro. Viroj kaj virinoj montris saman obstinon kaj la ideo ke ili povus perdi sian loĝlokon, fari vivi pli timinda ol morti.

Kontraŭ tiuj ĉi urbo kaj popolo, do, Cezaro Tito, ĉar surprizatakon malebligis ĝia situo, decidis batali per bataldigoj kaj atak-turoj. La taskoj dividiĝis laŭ la legioj, kaj estis paŭzo en la batalado, ĝis oni pretiĝis ĉion por konkero la urbon, ĉu laŭ praaĵ inventoj ĉu laŭ moderna tekniko.

Kaj kiam, en ĉapitro 14, Tacito komencas la priskribon de l' preskaŭ samtempa insurekcio de la Batavoĵ, la teksto subite haltas meze de sceno...

El aliaj fontoj ni scias, kiel la Romaj legioj batis la Batavoĵn kaj kiel Jerusalemon ili konkeris, kie en 70 p.Kr. iu sol-

dato ekbruligis la grandan templon de JHVH. La postan triumfon eternigis la famega triumfarko de Tito en Romo ĉe la malnova Forumo Roma.



Poste Tacito verkis sian famegon Analoj. Origine ĝi estis titolita *Depost la forpaso de l' Diigita Aŭgusto*; ĝi ampleksas la historion de la Julia-Klaŭdia dinastio ekde tuj antaŭ la morto de Aŭgusto (14 p.Kr.) ĝis la morto de Nerono (68 p.Kr.). Tio estas la momento, ĉe kiu siatempe li komencis la verkadon de siaj Historioj. Tiel do, ambaŭ kune, kvankam en inversa sinsekvo, kovras la jarojn 14–96 p.Kr. Tamen, pluraj partoj perdiĝis. El la Analoj mankas iom pli ol du jaroj pri Tiberio, la kompleta traktado pri Kajo (= Kaligulo), duono de Klaŭdio kaj la lastaj du jaroj de Nerono; tamen tio ĉi estas nur dek kvar el la kvindek kvar jaroj de la tuta periodo. La plimulton de la Analoj ni do ankoraŭ posedas. Certasence tio estas iomete miraklo: dum preskaŭ dek kvar jarcentoj oni tute ne aprezis lian verkaron. La Analoj postvivis dank' al unu sola manuskripto Mezepoka pri duono de l' verko kaj alia pri la lasta parto.

El la analoj: dinastiaj kvereloj en Armenio kaj Partio

31 (37): 1 Dum la konsuleco de Kajo Cestio kaj Marko Servilio venis nobelaj Partoj en la Urbon, sen ke ilia reĝo Artabano tion sciis. 2 Pro timo je Germaniko, tiu reĝo komence estintis fidinda por Romo kaj justa al siaj subuloj, sed poste li fariĝis sendependema je ni kaj

kruela al sia popolo; fidante je sia milita sukceso kontraŭ ĉirkaŭaj nacioj, kaj malŝatante Tiberion pro ties oldeco kaj avida pri Armenio, en kiu post la morto de l' tiea reĝo Artaksio li reĝigis sian pli aĝan filon Arsako, li aldone sendis delegacion kun insultoj por elpostuli la trezoron, kiun la ekzilita reĝo Vonono estis lasinta en Sirio kaj Kilikio; krome li arogantis pri la malnovaj limoj de la imperioj Persa kaj Macedona, kaj brutale kaj minace blufis, ke li invados ĉion, kion posedis unue Ciro kaj poste Aleksandro.

3 La ĉefa instiganto por la sendo de l' sekreta delegacio Parta estis Sinako, riĉega nobelo, kaj lia precipa helpanto estis la eŭnuo Abdo. Tio ĉe la barbaroj ne estas malŝatata specio, sed ja aŭtomate havas povon. 4 Ankaŭ aliajn gravulojn ili konsultis. Ĉar ili trovis en la gento de l' Arsakidoj neniun por surtroniĝi, ĉar la plimulton Artabano ja mortigis aŭ estis ankoraŭ ne adoltaj, ili petis de Romo kiel reĝon Fraaton, la filon de reĝo Fraato: bezonaj estas nur mono kaj aŭtoritato: tiel laŭ iniciato de l' Cezaro sin montru ĉe la bordo de Eŭfrato ido de Arsako.

32 (38): 1 Tion aprezis Tiberio.



Li do subtenas la novan „reĝon”. Intertempe Artabano malkovras la konspiron.

Li invitas al festeno kaj venene mortigas Abdon; Sinakon li tenas okupita per negravaĵoj S kaj, feliĉe por li, Fraato subite mortas. Sed Tiberio gustumis la ekstera-politikan ludon: li trovas novan princon, Tiridaton.

Tiam la intrigoj fariĝas terure komplikaj. Alternas Mitridato, Farasmeno,

k.a. kaj pluraj Romaj generaloj. Alia Tiridato poste reaperas en la Dekkvina Libro de l' Analoj, kie ni renkontos lin.

El la Dekkvina Libro: honoro al Nerono

28: 4 Je l' fiksita dato, Tiberio Aleksandro, fama Roma kavaliro, kiu partoprenis la kampanjon kiel konsilanto, kaj Viniciano Anio, la bofilo de Korbulono, kiu ankoraŭ ne sufiĉe aĝis por la senato kaj kiel vic-legato oficis ĉe la Kvina Legio, venis en la kampadejon de Tiridato, unuflanke por honori lin kaj krome, por ke li ne timu embuskojn kun tiaj garantiuloj.

Poste ambaŭflanke oni prenis po du-dek kavalerianoj. 5 Je la ekvido de Korbulono, la reĝo kiel unua desaltis de l' ĉevalo. Senhezite Korbulono agis same, kaj ambaŭ piedire premis reciproke la manon.

29: 1 Dekomence la Romano laŭdas la junulon, ke seniĝinte de riskaĵoj, li preferas bonan sekurecon. 2 La alia, post longa enkonduko pri sia nobela deveno, aldonis modeste la jenon: Li ja iros al Romo, kaj al la Cezaro li prezentos novtipan honoron: ke Arsakido kvazaŭ petege omaĝos lin, eĉ sen ia Parta malprospero. 3 Tiam ili decidis, ke Tiridato metos apud la bildon de l' Cezaro siajn reĝajn simbolojn, kaj ke li ricevos ilin nur el la mano de Nerono. La interparolon interkisado finis.

4 Kelkajn tagojn poste ambaŭ armeoj pompe paradis, unuflanke trupo post trupo de kavalerio, kun iliaj patrujaj insignoj, aliflanke staris la vicoj de l' legioj, kun flagre brilaj agloj kaj standardoj; kaj ĉiuj Di-statuoĵoj pensigis pri tem-

plo. 5 Meze sur estrado kurula seĝo kun portreto de Nerono. 6 Al ĝi Tiridato aliris. Post la kutimaj oferoj, la diademon li deprenis de l' kapo kaj metis ĝin ĉe la bildo. Ĉies animoj estis funde tuŝitaj, des pli ĉar la imago pri la buĉitaj kaj la sieĝataj Romaj armeoj ankoraŭ fiksiĝis en iliaj okuloj. 7 Sed nun ĉio renversiĝis. Tiridato iros montri sin al la popoloj, ĉu vere malpli ol militkaptite?

noto:

Ankaŭ el aliaj tekstoj ni scias pri la posta vizito de Tiridato al Nerono.

En 66 p.Kr. finfine ĝi realiĝis kaj fascinis la Urbon: Tiridato, reĝo de Armenio, venis al Italio kune kun la tri filoj de najbaraj Partaj regantoj. Ilia vojaĝo, kiu komenciĝis ĉe Eŭfrato, estis kvazaŭ triumfovojaĝo. Tuta Romo estis ornamita per girlandoj kaj lumoj, kaj ĉie surtegmente staris la homoj, dum Tiridato adorkliniĝis antaŭ Nerono. Tiridato, nomante sin ido de Arsako, la fondinto de l' Parta Imperio, aldonis: Mi venis al vi, por adorkliniĝi, kvazaŭ antaŭ iu Dio, same kiel mi faras antaŭ Mitrao. Post tio Nerono redonis al li la diademon, konfirmis lin en lia reĝeco super Armenio kaj post tio „la reĝo ne reiris laŭ la sama vojo, kiun ili sekvis alire” sed revojaĝis velŝipe. Tiel informas nin Kasio Diono (Roma Historio 63:1-7), Suetonio (Nerono 13) k.a. Plinio la Pliaga (Nat. Hist. 30:6:16-17) nomas Tiridaton kaj lian akompanantaron magoj. — Pro tiuj relative novaj okazaĵoj, la unuaj legantoj de l' evangelio laŭ Mateo 2:2 supozeble ne trovis romantika mirrakonto tiun historion pri „vizito de magoj el oriento”, kiuj poste „returniĝis hejmen laŭ alia vojo”. Eble ili vidis en ĝi eĥon al tute ĵusa politika vizito...

Gerrit BERVELING

81a Germana Esperanto Kongreso

Je Pentokosto okazis la 81a Germana Esperanto-Kongreso en urbo Neubrandenburg (Meklenburgio-Antaŭpomerio), kiun partoprenis 160 personoj el DE, DK, NL, PL, LT, Moldavio, CZ, Hungario; GB, Ĉ.

En la programo de la GEK ni aranĝis ekumenan diservon en la kirko de Sankta Johano. Ĝin partoprenis ĉirkaŭ 50 kongresanoj.

Celebris pastroj Albrecht KRONENBERGER kaj Peter BAESS.

Krome en hotelo/kongresejo okazis du modestaj matenaj diservoj.

Dum membrokunveno la membroj de KELI elektis novan estraron por la germana sekcio.

La morto de Adolf BURKHARDT metis sian ombbron sur la kunvenon, kvazaŭ kiel aŭdiaŭo la libro pri liaj vivo kaj agoj kuŝis en la kongresa libroservo.

Tre kore via

Werner PFENNIG

PS. Bonvolu atenti mian (iomete) novan adreson:

Werner PFENNIG

Uns Hüsung 29/0705

DE 17034 Neubrandenburg

Tagordo de la jarkunveno de KELI 2004

- 1 Malfermo
- 2 Elekto de la kunprotokolantoj.
- 3 Funebra memorigo.
- 4 Sekretaria raporto.
- 5 Kasista jarraporto.
- 6 Raporto de la kaskontrolantoj.
- 7 Buĝetoj
- 8 Raporto de la redaktoro de *Dia Regno*.
- 9 Estrarelektoj.

Ĉi-jare finiĝas la deĵorperiodo de Zoltan SOMEHGYYI, Britta REHM, Els VAN DIJK. Britta REHM estas reelektebla, Zoltan ankoraŭ ne reagis kaj Els VAN DIJK estas reelektebla sed kun granda hezito. Pasinta jaro estis la prezidanto Jacques TUINDER reelektita por unu jaro. Ĝis nun nova prezidanto ne estas trovebla.

Dum tiu ĉi kongreso ni devas decidi pri la estonteco de KELI ĉar sen novaj estraranoj kiuj povos postsekvi KELI ne havas estontecon. KELI kunigas Esperanto-parolantajn Kristanojn el multaj landoj sed sen *Dia Regno* kaj estraro ni ne povus daŭrigi.

- 10 Kongresaj planoj.

Propono:

La 17a Ekumena Esperanto-Kongreso en Piliscaba, Hungario, apud Budapeŝto kune kun la 7a JET 2005 (junulara Ekumena Esperanto-Tendaro).

- 11 Ideoj kaj sugestoj de la membroj.
- 12 Fermo.

Els VAN DIJK



Novgeedzoj Polnický

Karaj amikoj,
jen la ridetoj de novgeedzoj Pavel POLNICKÝ kaj Marcella POLNICKÝ post kiam ili eniris la geedzan staton, kio okazis la 5an de junio 2004.


Mi forte esperas, ke en la sama feliĉo kaj ridetoj, kiajn mi kaptis ĉe ili tuj post la ceremonio (rig. foton), akompanu ilin dum la tuta komuna vivo.

Dio benu al ili!

Amike, Petro CHRDLÉ



Esperantistoj estas homoj, kiuj „en la laboro paca ne laciĝas”, sed multaj volonte aliĝas al ekzistantaj iniciatoj. En la urbo de la KELI-prezidanto, je la unua sabato de ĉiu monato, kunvenadas en multpublika butikstrato homoj por kreskigi „rondon de silento”. Proverbo diras, ke konsentas tiu kiu silentas, sed ĉi tie la duonhora silentado — ĉirkaŭ monumento plena de pacaj tekstoj kaj simboloj — signifas tre fortan proteston kontraŭ ĉiuj formoj de militado, perfortado kaj ekspluatado. Partoprenas principaj kaj hazardaj homoj de kiuj ajn konvinkoj politikaj kaj religiaj.



Financa Raporto de KELI 2003 (Ĉiuj sumoj en EUR)

		Bilancoj fine de la jaroj	
		2002	2003
Aktivoj	PB-Ĝiro (PB = Postbank NL)	287,98	1.508,03
	PB-Kapitaalrekening (3%)	11.935,18	26.783,69
	PB-Rentumatesto (4%)	18.151,21	0,00
	UEA-konto kelk-p	1.571,95	2.465,95
	Kasista kaso	51,64	134,62
	E-Misio, Laiconas	0,00	304,59
	Monrimedoj	31.997,96	31.196,88
	E-Misio, 4% prunted. K.Leja	939,41	0,00
	Kuranta konto K. Leja	3.218,03	1.641,10
	Pavel Polnický, EB	51,57	0,00
	4.209,01	1.641,10	
Stokoj (libroj)	347,66	4.857,53	
E-Misio, Kasedoj D.K.	211,60	211,70	
	559,26	5.069,23	
Transitaĵoj	285,88	567,00	
Aktivoj sume	37.052,09	38.474,21	
Pasivoj	Kapitalo	3.898,14	4.587,86
	Saldoj negativa/pozitiva	935,21	-136,33
	Kapitalo entute	4.833,35	4.451,53
	Dumvivaj membroj	2.746,81	2.614,73
	E-Misio	6.890,18	7.908,97
	Helpa Kaso	2.795,37	2.268,37
	Junulara helpa Kaso	337,45	337,45
	Kongresa reserva Kaso	1.871,88	1.771,25
	Literatura/Himnara Kaso	12.427,86	12.427,86
	Informada/Varbada Kaso	54,72	54,72
Legaco C.P.W.	2.268,90	2.268,90	
Legaco E.t.O.-W.	2.268,90	2.268,90	
Fondusoj entute	31.662,07	3.1921,15	
Pasivo		1.180,00	
Kreditoroj	287,22	450,58	
Transitaĵoj	269,45	470,95	
	556,67	2.101,53	
Pasivoj sume	37.052,09	38.474,21	

Rezulto 2003 kaj buĝetoj 2003, 2004 kaj 2005
(Ĉiuj sumoj en EUR)

	Buĝeto 2003	Rezulto 2003	Buĝeto 2004	Buĝeto 2005
Elspezoj				
Presisto	4.000	3.745,43	3.700	5.100
Perantoj	30	20,00	20	20
Revukostoj	4.030	3.765,43	3.720	5.120
Prezidanto	30	0,00	20	20
Sekretario	60	55,60	60	60
Redaktoro	120	120,00	120	120
Kasisto/Matrikulisto	80	63,51	70	70
Estrarbulteno	15	0,00	0	0
Estrarkostoj	305	239,11	270	270
UEA-kotizo	50	50,00	54	54
Ĉambro de Komerco	35	33,98	35	35
Kaskontrolo	35	33,70	35	35
Bankkostoj	30	17,15	20	20
Merituloj	35	0,00	20	20
UK Lukostoj	90	140,00	140	140
Ĝeneralaj kostoj	275	274,83	304	304
Librovendado (kostoj)	50	1.309,52	0	0
Varbado (Inf./varba kaso)	25	223,75	25	25
Rabatoj de Perantoj	25	12,40	20	20
Kursdiferenco		-4,94	0	0
	100	1.540,73	45	45
Elspezoj entute	5.150	5.820,10	4.339	5.739
Enspezoj				
Kotizoj/Abonoj	3.700	3.190,79	3.300	3.200
Kotizpagdiferencoj	10	-19,87	0	0
Librovendado	100	1471,80	200	200
Kotizoj entute	3.810	4.642,72	3.500	3.400
Rentumoj	800	540,46	500	500
Adopta Kaso	700	500,59	450	450
	1.500	1.041,05	950	950
Enspezoj entute	5.310	5.683,77	4.450	4.350
Saldoj	600	-136,33	111	-1.389

KLARIGOJ KAJ RIMARKOJ PRI LA BILANCO 2003-12-31

Aktivoj

Kuranta konto K.Leja: Sumo pro antaŭpago por DR en 2004.
Stokoj: Sanktaj Biblio (8), Biblio nova NL (35), Biblio nova PL (350), Novaj Testamentoj broŝ. (73), Novaj Testamentoj bind. (29), Evangelioj laŭ Johano (237), Adoru Kantante (10), Nia historio (6), Esperante kaj Ekumene (30)

Ni aĉetis 500 Bibliojn kaj stokis 150 ĉe la sekretario en NL kaj 350 ĉe la eldonisto de DR en Pollando. Ni ankaŭ aĉetis 30 ekzemplerojn de Esperanto kaj Ekumene, libro honore de Adolf Burkhardt.

E-Misio kasedoj: Dimanĉa koncerto (73)
La vendontoj estas petataj kontakti la kasiston.
Transitaĵo: Rentumo el Kapitalrekening 2003 estas 567 EUR (ricevota en 2004)

Pasivoj

Kapitalo: Estas la libera kapitalo, alian vidu sub Fonduso
Saldo negativa: La kotizenspezoj kaj la donacoj po AK malaltiĝis, ankaŭ la rentumo el la kapitalo.
Helpa kaso: Estas por helpo al nepagipovaj membroj partopreni kongreson. En 2003 ni helpis al 4 gefratoj.
Kreditoroj: Hungara kaso 355,33 EUR (Iren Bagl), Brita kaso 95,25 EUR (Diana Richardson)
Pasivoj: El ricevo de kongreskotizo 280 EUR, el fakturo por Esperante kaj Ekumene 900 EUR, 1180 EUR
Transitaĵo: Postulo al Bernhard Eichkorn el aĉeto de Biblio -429,05 EUR, Antaŭricevitaj britaj kotizoj 900,00 EUR, 470,95 EUR

KLARIGOJ PRI LA REZULTO 2003 KAJ LA BUĜETOJ 2004/2005

Kotizoj pagendaj de
Membroj individuaj158 (177) Nuraj abonantoj ... 23 (30)
Membroj familianaj13 (17) IKUE-abonantoj ... 20 (18)
Membroj subtenantaj3 (5) 43 (48)
Membroj dumviva24 (25)
Membroj adoptitaj 156 (153)
354 (377)

Malkreskas la membraro, grandparte pro maljuniĝo. Modeste ni gajnis novajn membrojn kaj abonantojn, sed ne sufiĉe por prosperi.

Librovendado: La kostoj aŭ enspezoj por librovendado influas la saldon.
Adopta Kaso: Mono donacita de la KELI-membraro por membroj, kiuj ne povas pagi la kotizojn aŭ nur parte. Estas membroj en Albanio, Afriko, Bulgario, Ĉeĥa Respubliko, Ĉinio, Estonio, Hungario, Jugoslavio, Latvio, Litovio, Pollando, Rumanio, Rusio. Ili estas petataj kontribui "laŭforte" (kotizo laŭ interkonsento kun la landa peranto). Koregan dankon al ĉiuj donacintoj kaj donacintoj. En 2003 enfluis
Kotizoj hungaraj 100,00, polaj 13,16, ĉeĥaj 120,00 EUR
Donacoj Brita KELI-sekcio ... 60,00, finna ... 83,00, nederlanda ... 30,00 EUR
Unuopaj membroj entute 94,43 EUR

Saldoj 2003, 2004 kaj 2005: En 2003 kaj 2004 ni ankoraŭ povas esti kontentaj. Ni aldonas DR en Pollando, kiu eniris EU. Pro tio nun estas pagenda VAT-impoto je 22%. Kune kun altiĝo de kostoj fare de la eldonejo je 10% ni havos netolereblan deficon en 2005.
Ni pripensu solvon por redukti la kostojn.

LESSING—jubileo

Lessing-jubileo (naskiĝo antaŭ 275 jaroj)
Gotthold Ephraim LESSING

(* la 22an de januaro 1729 en Kamenz, † la 15an de februaro 1781 en Braunschweig) estis germana verkisto, ĵurnalisto kaj filozofo.

La granda reprezentanto de la racionalismo verkis komediojn kaj tragediojn, poemojn, fabelojn kaj rakontojn. Liaj idealoj estis humaneco, libereco kaj toleremo. Li kontraŭis antaŭjuĝojn kaj la kuratorecon de la eklezio kaj la nobelaro.

Famaj verkoj:

- *Der junge Gelehrte* (1748)
- *Die Juden* (1754)
- *Der Freygeist* (1755)
- *Miss Sara Sampson* (1755)
- *Philotas* (1759)
- *Fabeln* (1759)
- *Laokoon* (1766)
- *Minna von Barnhelm* (1767)
- *Emilia Galotti* (1772)
- *Nathan der Weise* (1779)

En Esperanto aperis

Minna de Barnhelm: aŭ soldata feliĉo: komedio en kvin aktoj / de Gotthold Ephraim Lessing. Esperantigita de Adolf Reinking. — Wolfenbüttel: Heckner, 1910. — 84 p.

Fabloj de Lessing / el germana lingvo trad. L. E. Meier. — Leipzig: Esperanto-Propaganda Instituto, [1912]. — 16 p. — (Dekspesdeka Biblioteko Esperantista ; 8) (10—Spesdeka Biblioteko Esperantista; 8)

Natan la saĝulo: drameca poemo en kvin aktoj / Gotthold Ephraim Lessing. Trad. el la germana lingvo de Karl Minor. — Berlin [k.a.]: Ellersiek & Borel, 1923. — 208 p. — (Nova Esperanto-Biblioteko; 9)

Fabloj / Reinhard Haupenthal [trad.]. — Saarbrücken: Iltis, 1985. — 41 p. — (Jubilea Eldonserio 2, Beletro Tradukita; 13)

Rete legebla

El la fablaro

El Natan la saĝulo: drameca poemo en kvin aktoj

Lessing estas Natan. La saĝulo, kiu klerigas pri Dio kaj la mondo. La pensanto, kiu

montras al ni la vojon al paca kunvivado. Oni preskaŭ ne povas trotaksi la spirithistorian efikon de la **Ringparabolo**.

„**Kia kredo, kia leĝo pleje kompreneblas al vi?**” demandas la Sultano Natanon.

Tio estas la demando al la vera religio, al la ununura, ĉiama vero. Kie ĝi estas trovebla? Ĉu en judismo ĉu en islamismo, ĉu en kristanismo? Kaj ankaŭ tio baziĝas en la demando: Se ekzistas nur unu vera religio, kiun ekzistrajton tiam havas la aliaj? La krucmilitoj — en tiu tempo ludas la dramo — prezentas kruelan ekzemplon de la imago al Lessing, ke kristanismo estas la vera religio.

Lessing rakontas per Natano parabolon kiel respondo al la demando:

Ek de homa memoro heredigis en familio la patro ĉiufoje al la plej ŝatata filo valoregan ringon, kiu estigis agrabla antaŭ Dio kaj homoj tiun, kiu portis ĝin tiel fidante. Fine venis la ringo al patro, kiu amis siajn tri filojn samgrade. Pro tio li komisiis la verkadon de du pliaj samaspektaj ringoj kaj donis al ĉiu el la tri unu ringon sub la kondiĉo, porti ĝin nur post sia morto. Post la forpaso komenciĝis kverelo, ĉar ĉiu opiniis sin posedanto de la vera ringo. Sekvis esploro, disputo kaj plendado — vane, ne montrebli estis la ringo malfalsa. Sed prudenta juĝisto dispoziciis, se tiu devus posedi la veran ringon, ties vivo pruvigas la forton de la ringo.

„Nu bone, ĉiu konsideru sian ringon la ĝustan, eble via patro ne plu volis toleri en la familio la tiranecon de nur unu ringo. Kaj ĉiu nun sen antaŭjuĝo pruvu la amon sian sen influiteco. Kaj ĉiu inter vi nun vetklopodu, elmontri la forton de la ŝtono en la ringo. Helpu al la forto per bonfaro, bonkoreco, pace-meco kaj pleja devoteco antaŭ Dio! Kaj se de l' ŝton' la forto videbliĝos estonte ĉe pra-pra-infanoj viaj: Ja tiam ilin ree mi invitos al mi post mil' kaj mil' da jaroj. Tiam pli saĝa vir' ol mi ĉi tie sidos kaj juĝos. — Iru for!”

Kompilis: Siegfried KRÜGER

